# Sennaciulo

17a jaro. N-ro 11
NOVEMBRO 1946

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

*Asocia sidejo de S.A.T. kaj administrejo: 67 avenue Gambetta, Paris 20.*
*Redaktoroj K. ĉo L. Bannier, ĉe SAT, Parizo kaj Bas Wels 1a Wandeloorddwarsstraat 33, Rotterdam.*
*Eldonejo de SENNACIULO: C. van Essen, Floretstraat 10, ROTTERDAM, Z.*

# Al ĉiuj Membroj!

**Kiam vi estos ricevintaj tiun ĉi numeron de „Sennaciulo", tiam jam estos malfrua aŭtuno aŭ eĉ vintro. La nova jaro alproksimiĝas rapidpaŝe, k jam konvenas al ni ĵeti rigardon malantaŭen, al la tuj finiĝonta jaro.**

**1946 estas en la historio de nia Asocio jaro kun certa gravo. Ĝin forgesi ni ne facile povos, ĉar post interrompo de pli ol kvin jaroj, nia Asocio en ĝi rekomencis funkciadi pli malpli normale. Ni diras: pli malpli normale, ĉar dum la tuta jaro ni estis ĝenataj de tiom da obstakloj, ke absolute ne eblis funkciigi la Asocion tiel, kiel ni dezirus. La milito premas sian stampon ankoraŭ sur ĉion, la tuta socio estas perturbita: la mono blokita, pro kio ni ne povas disponi pri la kotizoj en multaj landoj. En granda parto de Eŭropo ni estas malhelpataj de damnita cenzuro, kiu koncerne nian lingvon ĉiam estas en embaraso k pro tio ofte baras niajn poŝtaĵojn. En aliaj landoj la aliĝo al nia Asocio estas aŭ tute neebla aŭ jam faro suspektinda, ĉar malgraŭ tio, ke la diktaturo malvenkis en la lasta milito, la demokratio ne multe gajnis per tio. Cetere la L.E.A.-oj ankoraŭ ne sukcesis varbi multajn novajn anojn, k nature ankaŭ nia Asocio suferas pro tio. Aranĝi kongreson kun ŝanco de sukceso, ni ne povis pro la postmilita ĥaoso interlanda. Ne, ni ne rajtas paroli pri normala funkciado de S.A.T. en 1946, ni ne rajtas fanfaroni pri brilaj sukcesoj. Sed konsiderante la malfacilan tempon en kiu ni ankoraŭ vivas, ni ne bezonas honti, ni rajtas esti almenaŭ kontentaj pri tio, kion SAT jam atingis de post la finiĝo de la mondkatastrofo. En du landoj la sukceso estis eĉ mirinde granda. Ni celas Francion k Nederlandon. Per la forto de nia Asocio en tiuj du landoj SAT sendube povos elteni en tiu ĉi malfavora tempo k daŭre helpi al la disvastigo de la laborista esperantismo en aliaj regionoj. Ni povas esti certaj, ke kun la normaliĝo de la internacia situacio ankaŭ tiu disvastiĝo venos, k precipe en meza Eŭropo ni atendas grandan floradon de nia movado tuj kiam la materia stato de la tie loĝantaj popoloj k la politika situacio estos tiaj, ke ree estos loko por kultura vivo.**

**Sed tio estas „muziko estonteca". Provizore NI, kiuj portis la Asocion en la unua jaro post la dua mondmilito, devas flegi ĝin per granda fideleco k plena sindono. K jen, kio estas via tasko plej proksima: pagi jam nun vian kotizon por la jaro 1947. Pagu laŭ via kutima maniero, ĉu al la sekcia peranto, ĉu rekte al via landa peranto aŭ al SAT Parizo, sed pagu tuj! Aginte tiel, vi sendube estos trapenetrataj de agrabla sento, sento de kontenteco pro tio, ke vi plenumis vian moralan devon al via movado.**

**Sed antaŭ ol vi sendos vian kotizon al ni, pripensu, ke fakte por vi ne estas tre malfacile varbi almenaŭ unu novan membron por la Asocio. Gis nun vi eble ne multe atentis tiun taskon, sed konfesu mem: vi tre facile povas varbi almenaŭ unu novan anon. Do jen la devizo: En 1947 la SAT-anaro duobliĝu! K al la realigo de tiu devizo ni ĉiuj kunlaboru! Ni ĉiuj, kvankam ni atendas de niaj perantoj, ke precipe ili en la plej proksimaj monatoj kun granda entuziasmo k sindono agados por plipotenciĝi nian movadon en la tuta mondo.**

**B. W.**

# 20-a Kongreso de SAT
## en Aarhus
## 2. - 7. de Aŭgusto 1947.

**2-a komuniko.**

Adreso de OKK.
Prezidanto: K-do Magnus Jacobson, Brendstrupvej 8, Aarhus, Danio.
Kasito: K-do Holger Hansen, Haslevej 13, Aabyhøj, Danio.

**Kotizo:** La kongreskotizo estas 13 danaj kr. por SAT-anoj kaj 16 dKr. por ne-SATanoj. Por frualiĝontoj (antaŭ la 1-a de junio 1947) la kotizo estas 10dKr. (SAT-anoj) K 13 dKr (ne-S.A.T.-anoj).

Monon sendu per poŝtmandato al la kasisto aŭ per ĝiro laŭ jena adreso: Organiza Kongresa Komitato 1947, — La kasisto, Aahyhøj — Danio (Postĝirokonto 58199 (Kopenhago)).

En Francio oni pagu al la poŝtkonto de: S.A.T., 67, avenue Gambetta, Paris 20 (No. 1234-22 Paris)

Nederlando pagu al k-do C. van Essen, Floretstraat 10, Rotterdam Z. (poŝtmandate)

En aliaj landoj la kongresanoj pagu al la landa SAT-peranto, se ne eblas sendi la monon al ni.

**Kongresejo:** La kongreso okazos en FOLKETS HUS (Popola Domo), kiu situas centre de la urbo.

**Karavano:** Ni petas aranĝontojn de karavanoj sin turni al ni.

**Fakkunvenoj:** Ni ankaŭ petas la diversajn frakciojn sin turni al ni tiel ke ni povos bone aranĝi la frakcikunvenojn, kaj ni ankaŭ intencas aranĝi fakkunvenojn, se tio estas dezirata.

**Loĝado:** Tiuj, kiuj deziras loĝi en **hotelo,** povas havi unuopajn ĉambrojn je 4-6kr., duoblajn ĉambrojn je 7-10 kr., grupajn ĉambrojn (4-8 personoj) por 2,75 kr.; se oni mem **kun**portas littolaĵon nur 2 kr. Estas lankovriloj en la litoj.

Tiuj, kiuj deziras **amasloĝejon,** mem devas kunporti dormsakon, nur matracoj troviĝas. Por tio oni pagu 0,75 aŭ 1,00 kr.

Se iuj deziras loĝi en **tendaro,** tia ankaŭ estas sufiĉe longe ekster la urbo.

Por tiuj, kiuj deziras loĝi en **junulargastejo,** ni povas havigi 40 lokojn je prezo de 0,75 kr. por mempurigado kaj 1,50 kr., se oni ne mem purigos.

---

**SAT ne havas soci-politikan programon nek planon por ordigi k paciĝi la mondon, sed en ĝia kadro SENNACIECA prepariĝas necesa materialo konstrua, sen kiu neniam efektiviĝos io pozitiva rilate mondpacon.**

# La tragedio de nia generacio.

La grava fakto en la mondpolitiko estas la granda Sovetia ofensivo en la nuna postmilita periodo. Ofensivo, kiu sugestas, ke la mondo nur povas esti feliĉa, se ĝi ne nur sur ekonomia k socia, sed ankaŭ sur politika k kultura terenoj montras la Sovetian strukturon. Ofensivo, inspirita de la konvinko, ke Sovetio estos nur eksterdanĝera, kiam estos en la tuta mondo la sama strukturo, kia en Sovetio. Ĝis kiam ekzistos grandaj, potencaj ŝtatoj kun kapitalisma ekonomio, Sovetio sentos sin minacata, ĉar ĝi timas, ke la ekspansio, nedisiĝeble ligita al kapitalismo, ne haltos ĉe Sovetaj limoj. Kvankam la kapitalismaj ŝtatoj nun ankoraŭ ne havas malamikajn planojn kontraŭ Sovetio, la Rusoj pensas laŭ dekoj da jaroj k laŭ kontinentoj. Ili do pripensas, kio povos okazi en Ĉinio, Hindio, Iran, Turkio k Eŭropo, kiam la sekvoj de la dua mondmilito estos forigitaj sub gvidado de la usona kapitalismo.

Tial Sovetio klopodas akiri sub kontrolo tiujn teritoriojn, k tio samtempe pligrandigos la defensivan forton de Sovetio en Eŭropo. Ĝi do klopodas konkeri tiujn landojn, k en la ŝtatoj, kiujn ĝi okupis dum la lasta milito, ĝi instalis registarojn, bonvolaj al ĝi. Tio estas komprenebla. Sed la grava malfacilaĵo troviĝas en la fakto, ke alta grado de bonvolo ne sufiĉas. Ekz. la angla registaro ŝatas sincere kunlabori, sed „Labour"-registaro ne plaĉas al la Rusoj. Tia registaro a havas siajn proprajn principojn, estas sendependa de Moskvo k ĝi tre ŝatas la demokration k ĝiajn principojn. Ĝi faras ion ankoraŭ multe pli gravan. Je la unua fojo en la angla historio ĝi „Labour", havas la plimulton en la parlamento k iom post iom ĝi rompas la influon de la kapitalismo en Anglio. Tiu registaro bezonas tiun plimulton dum certe 25 jaroj por elradikigi la tutan anglan kapitalismon. Malgraŭ tio la sukcesoj estas jam grandaj k la sociala politiko faris la anglan laboriston unu el la plej bone ŝirmata en la mondo k li vivas sur konsiderinde pli alta nivelo ol la Sovetiaj laboristo k kamparano. Kaj jen unu el la faktoj, kiu ne plaĉas al la Sovetiaj regantoj. Tial ili ankaŭ ne ŝatas registarojn laŭ la demokratia tipo en la tuja proksimo. Tial ni vidas en ĉiuj landoj, ĉirkaŭantaj Sovetion, unuecpartiojn, kiuj regas la landon, k sur la fono la minacantan ombron de la Ruĝa Armeo kiel decida argumento.

Ankaŭ en Proksima Oriento, de Iran ĝis Arabio ne estas ŝtato aŭ grupo da ŝtatoj, kiu povus kontraŭstari Sovetion. Eĉ lando, kia Ĉinio verŝajne nur kun helpo de ĉinaj komunistoj povus defendi sin kontraŭ rusaj influoj.

Se ni superrigardas la fortojn en Eŭropo, tiam ni konstatas, ke ne ekzistas ŝtato, kiu povus mezuri siajn fortojn kun tiuj de Sovetio. Eĉ Anglio pro la ĵus finiĝinta milito estas tute elĉerpita k certe ne kapablas komenci novan lukton. Cetera Eŭropo estas ankoraŭ pli grave vundita, disŝirita k senpotenca.

La nuraj rezistpovoj estas en Usono. Finfine la Rusoj ĉie interpuŝiĝas kun la Usonanoj. Sed tio signifas, ke Sovetio vidas sian vojon barita de Regno, kie en la nuna, por la mondo tiel grava periodo, regas nesaĝa kapitalismo.

Tio estas la tragedio de ĉi tiu postmilita periodo. La demokratio, unu el la devizoj de ĉi tiu milito, mankas en la planoj de Sovetio k estas senpotenca en la forta k riĉa teritorioj de Usono, regata de kapitalismaj haoso k egoismo.

La tragedion de nia tempo ni povas skizi jene: ni lasis kreski la faŝismon k nacisocialismon anstataŭ frakasi ilin per (antaŭgarda) milito, kiam ili estis ankoraŭ kreskantaj danĝeroj. Post tia milito, kiu postulus relative malmultajn oferojn, postrestus sufiĉe da fortoj por organizi la pacon k la postmilitan mondon. Sed ni englitis militon kun malamiko tiom forta, ke li preskaŭ detruis nin, anstataŭ ni lin. La milito finiĝis k ni lasis la mondgvidadon en la manoj de nespertaj politikistoj, de malkleraj diplomatoj, de militistoj kun mezaĝa menso, de burokratoj k de komercistoj sen socialaj konscienco k scio. La spertuloj k fakuloj, kiuj trenis nin de unu katastrofo al la alia k kiuj estas organizantaj novajn mizerojn, sugestas al ni kredon al la Organizo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj, en la saĝeco de militheroj ktp.

Sed kiu ne konscias, ke ne ekzistas motivo por fieri pri la spertita mizero, nek pri la rezisto kontraŭ tiu mizero (kion faris nur la plej bonaj inter ni), ĉar ni ĉiuj estis la viktimoj de fortomanko, kiam ni povis ankoraŭ eviti la katastrofon, tiu estas destinata denove fariĝi la buĉoto, sen ia celo. Nur se ni rigardas la militon kiel gigantan fortodetruon, rezulton de nekapableco, okazintaĵon, kiu mizerigis nin ĉiujn, ni havas la ŝancon pri pli bona estonteco. Nur sinteno de „spirita sobreco", nur bone organizita laborego dum kelkaj jaroj povos gvidi nin el la marĉo, en kiun niaj potenculoj k herooj kondukis nin.

La faŝismo ne estas venkita, eĉ ne en Germanio, la tiranoj ne malaperis; kontraŭe ili plifortiĝis. Friponoj, mensoguloj k stultuloj ĉie okupas la honorlokojn. Tio estas realaĵo, neagrabla, nekuraĝiga. Sed nur la konstato de tiu fakto povas savi nin. Se oni operacios pacienton kun infektitaj manoj, li certe mortos, malgraŭ la talento k peno kun kiu la operacio estas farita k kiom granda la vivoforto de la paciento estas. Se oni politikumas kun infektita spirito, la rezulto povas nur esti venenado de la mondo.

Dum la ĵus pasinta milito neniu havis la kuraĝon klare diri, ke post finiĝo de la militaj operacioj necesos periodo de unu aŭ du jaroj por organizi la pacon k ke dum tiu periodo la popoloj devos resti mobilizitaj sub gvidado ne de militistoj, sed de politikistoj k teknikistoj por transformi la militproduktadon en pacproduktadon, kiu alportos saman abundon kiel dum la milito la miriga armilproduktado. Sistemaj ekonomio k produktado, sistema purigado de la mondo de ĉiaj en- k eksterlandaj faŝismoj, sistema konstruo de inteligenta k energia demokratio. Por tio la popoloj devos resti mobilizitaj. Se ili ne volas aŭ povas plenumi tion, ili pereos, k venkos tiuj grupoj aŭ landoj, kiuj restis en la kiraso. Se ne eblos kolekti la demokratajn popolojn de Usono, Anglio, Eŭropo, Afriko k nova Azio en tia sistema organizo, tiam estas certe, ke la nura ŝtato, kiu restis kiel organizita unuo, Sovetio, okupos per grandega fortostreĉo en la militlaca mondo, lokon, tiom potencan, ke ĝi superregos la mondon aŭ ke posta ribelo kontraŭ „rusifigado" de la mondo trenos nin denove en militon, same teruran, same nefruktedonan kiel la ĵus finiĝintan aŭ ...... verŝajne pli teruran, pli nefruktedonan.

Sed rezisto kontraŭ rusifigado de la mondo estu nur pozitiva. Ni devos konstrui demokratan mondon k pruvi, ke la demokratio estas kapabla organizi la mondon, ĝian prosperon k ĝian feliĉon.

Laŭ J. de Kadt (tradukis A. Vollegraaf).

## Al la Svedaj K-doj!

**Kompare al la grandeco de via L.E.A.-o vi estas tre malbone reprezentata en S.A.T. Estas via tasko almenaŭ triobligi la S.A.T.-anaron en via regiono. Vi certe sukcesos en tio, se vi daŭre klarigas al viaj samklubanoj, ke ĉiu esp-isto, kiu ignoras la tutmondan asocion k ne legas tutmondan gazeton, agas nekonsekvence k pruvas, ke li ne komprenas la esencan karakteron de nia movado. Tia esp-isto ja ridindigas Esp-on k degradas ĝin al iu ludilo.**

**Ek de nun vi ne haltigu vian agadon antaŭ ol ĉiu membro en via klubo estu ano de S.A.T. Fondu kolektivojn aŭ elektu laboremajn perantojn! Propagandu k agitu! S.A.T. devas iĝi pli impona, pli potenca. Al tio ankaŭ vi, Svedoj, helpu, por ke vi fariĝu la plej „esperanto-konsciaj" el ni ĉiuj.**

# PRI LA PATRIOJ.

Ke la popoloj ekonomie interdependas unu de la alia, montriĝis neniam tiel klare, kiel en tiu ĉi postmilita periodo. Ankaŭ la fakto, ke landlimoj estas io artefarita, aperas denove en la lumo de plej hela klareco. Kaj tamen ne nur la ekonomiaj kialoj kondukis al eksplodo de la milita katastrofo, sed same trude k neeviteble la moralaj k edukaj faktoroj. Ni eklernu k kutimiĝu al la ideo, ke funde la homoj estas esence samaj en ĉiuj kontinentoj k sub ĉiuj zonoj de la tero. Kompreneble ni distingas diferencojn, malsamecojn estigitajn per malsama klimato, malsamaj vivkondiĉoj k laborcirkonstancoj, estigitaj per la malegala terkvalito k diversaj geografiaj nuancoj. Sed anime, laŭ fizikaj k psikaj bezonoj, la homo nur tre malgrave diferencas sur la terglobo, k ĉio kio servas por disigi lin de lia natura frato, estas nur intrige aranĝita de la diversaj potenculoj, kiuj akaparis por si la riĉaĵojn de la tero. Civilizo montriĝis hontiga masko.

Multaj havis okazon fari tiurilatajn konstatojn eĉ dum la mallumaj militjaroj. Ankaŭ hodiaŭ ili ree enregistros siajn spertojn k tiros la sole ĝustajn, logikajn konsekvencojn. Ekzemple havas mi persone jam la okazon konversacii kun anoj de „venkintaj" nacioj. Neniun mi trovis, kiu ne emus akcenti la fakton observitan, ke ekzistas inter la homaro tiaspecaj k alispecaj uloj, t. e. bonuloj k malbonuloj. Malvarme observantaj homoj venas al konkludo, ke ne povas temi pri kolektiva malboneco de tiu aŭ alia gento aŭ nacio, pri malboneco kiu estas la brulstampo de ĉiu ano de difinita popolo. Ne, ili konstatas, ke la friponeco regas *ĉie* en la mondo, sendepende de tiu aŭ alia artefarita limo (lingva aŭ regiona), same kiel oni trovas homojn bonvolemajn k sociemajn ĉie en la mondo; eĉ en la plej fora angulo aŭ ie, kie oni malplej atendas ilin renkonti.

Se jam neesperantistojn penetris tia ideo, kiom pli ĝi devas radikiĝi en esp-istaj cerboj, kiuj dank'al komuna lingvo estas multe pli inklinaj al sennaciecaj pensado k vidmaniero. Tial ankaŭ ni ne povas kredi, ke la esperantistaro estonte ŝatos organiziĝi naciece (t.e. laŭ naciaj societoj k ligoj, laŭ naciecaj konsideroj). Se ili bezonos por la propagando iafoje la nacian lingvon, ili uzu ĝin nur en la kadro de l'neceso k de l' sufiĉo: ili neniel cedu al la nacieca ideologio per kreo de nacilingva gazetaro k societoj naci-teritoriaj, laŭ la modelo de l' neesp-istoj. Nia esp-ista organiz-maniero diferencu esence de tiuj, super kiuj ni havas la grandan avantaĝon de l'unulingveco. Tial ni estu sennaciuloj k konstruu nian organizon, *elire de la bazo,* racie sur la principaro de sennacieco (reprezentita per S.A.T.)

Kie ajn do ni loĝas, ĉu ni apartenas al venkitaj aŭ venkintaj popoloj, al ekonomie bonstataj aŭ malbonstataj regionoj, — ni ĉiam laboru unuavice por nia idealo, k ni varbu por tiu organizo, kiu ĝin fidele spegulas, t. e. por S.A.T.!

— N.B. —

# ĜUSTIGO.

Unu el niaj kamaradoj, kiu militservas en Hindoĉinio, informis min ke mia artikolo aperinta en la junia numero de „Kosmopolito" entenas neĝustaĵon. La francaj trupoj en tiu lando konsistas laŭ la proporcio de 90 % el nordafrikanoj, kaj ne el volontulaj eks-milicanoj, kiel publikigis la socialista gazeto „Le Populaire", en kiu mi ĉerpis la informon. — H. KASON —

# Helpo al „Sennaciulo".

K-do Polet, Lille 35 f.f. — K-do Miketo, Paris 50 f.f. — K-do Novion, Paris 25 f.f. — K-do Guilleman, Toulouse 100 f.f. — Assie 20 f.f. — F.L.E. sekcio Roterdamo III 7,75 gld. — C. de L. Amsterdamo 0,25 gld.

Ni kun danko kvitancas.

# Batalintoj por la Socialismo.

## MIĤAEL BAKUNIN.

### III.

La 27an de decembro 1861 Bakunin alvenis en Londono ĉe siaj amikoj Herzen k Ogarjoff, kiuj eldonadis la rusan gazeton „La Sonorilo", kiu certagrade estis tre influhava. Bakunin fariĝis kunlaboranto de tiu organo k baldaŭ premis sian stampon sur ĝin. Li estis la furiozeco mem. Li ne suferadis dum multaj jaroj en karceroj k Siberio por nun trankvile k modeste propagandi la liberecidealojn de la modera Herzen. Tamen en la unuaj jaroj post sia fuĝo el Siberio, Bakunin ankoraŭ ne fariĝis la disvastiganto de la anarkismo de l' ago. Provizore li okupis sin pri la rusaj problemoj, pri la liberigo de la Poloj k pri la kunfandiĝo de ĉiuj Slavoj. Li kulpigis la rusan registaron k la caron, ke ili estas tro germanaj. Li fakte proponis la militon kontraŭ Germanio kun Italio k Francio kiel samliganoj. Granda slava federacio devas esti fondata. La tuta popolo devas renaskiĝi, k la sola vojo por atingi tiun celon, estas laŭ li tiu de sincero k vero. „Ni povas esti nur la akuŝigistoj por la nova venonta rusa popolo. Ni zorgu, ke ni agu ne kiel doktrinistoj.

Sed Herzen, kiu parenteze donis al Bakunin el propraj rimedoj jarrenton de 1500 frankoj, certe ne ĉiam samopiniis kun la ekstrema Bakunin. Ili ambaŭ kredis al la monda destino de la rusa popolo. Ambaŭ estis ĝismedolaj Slavoj. La germanaj amikoj k elmigrintoj, estantaj en Londono — Ruge, Freiligrath k.a. — ĉiumomente havis okazon koleriĝi pro la sinteno de la Rusoj kontraŭ la germana elemento. Efektive Herzen k Bakunin deziris tutslavan demokration, kiu ankaŭ kun Germanio povos reguligi la konton. Sed rilate multajn aliajn problemojn ambaŭ amikoj ofte malsamopiniis. Tamen en „La Sonorilon" penetris la spirito de Bakunin k tio estis certe unu el la kaŭzoj, ke la organo perdis sian influon.

La 12an de oktobro 1863 Ogarjoff skribis al Bakunin: „Vi ĉiam estas en malkvieteco. Vi fanfaronas pri societoj kia „Tero k Libero", kiuj ne havas efektivan forton; vi transdonas vin al klaĉo k intrigado. Deturnu vin do de tiu revolucia agitado en la aero. Kondutu dece k akurate, precipe pri monaferoj."

La rompo estis neevitebla. Bakunin por ĉiam forlasis Londonon komence de 1864, k vojaĝis al Italio. Herzen poste iris al Parizo. Antaŭ sia morto li esprimis sin pri la 50-jara Bakunin, kiu nun baldaŭ komencos la batalon por la anarkia ideo k kontraŭ Karl Marks. La jenaj linioj estas fragmento el la juĝo de Herzen pri Bakunin.

„Kio koncernas Bakunin, lian laboradon, lian mallaboradon, lian potencan staturon, lian pasian avidon, ĉio estas ĉe li en giganta samproporcio, k grave transpasas la ordinaran nivelon ĉe aliuloj. Estante 50-jara, li restas la studento el la studenta kvartalo en Moskvo, la Bohemano el la Rue de Bourgogne en Parizo; sen zorgoj pri la morgaŭo k pri mono, kiun li dise jetadas k post tio ree pruntas de kiu ajn kun naiveco de infano, kiu kuras al sia patrino k ne pensas pri tio, ke li iam devos redoni la pruntitajon. Ĉi ĉion li faras kun la sama simpleco per kiu li mem fordonacas ĉion, kion li posedas, tenante por si mem apenaŭ rufiĉe por pagi siajn cigaredojn k teon. Laŭ karaktero li estas „granda vagabondo". En lia tuta naturo kuŝas io infana, io malferma, io tre simpla, kio donas al li apartan ĉarmon, kiu altiras ĉiajn homojn, fortajn k malfortajn. Nur afektuloj deturnas sin de li. Li portas en si la eblon esti agitisto, popolgvidanto, apostolo, parti- aŭ sekt-estro aŭ pastro herezula. Kien ajn oni lokas lin, ĉiam li ekstaros ĉe la plej maldekstra flanko. Li kuntrenos la amasojn k influos la sorto-destinon de l' popoloj."

★

Bakunin iris al Italio, k vivis la du unuajn jarojn (1864-1866) en Florenco. Al la rus-pola afero li nun turnis la dorson k suriris la pli larĝan vojon de la ĝenerala kosmopolita revolucio. Paŝon post paŝo li nun prilaboros k formulos la ideon de l' anarkio. Ĉe Proudhon la ideo restis nur teorio, doktrino, kiun oni sur papero aŭ en diskutado povas esplori, sekvi aŭ kontraŭstari; ĉe Bakunin tiu teorio transiras al la praktiko. Li ne estis nur la anoncanto de venonta uragano, ne, li laboros por eksplodigi ĝin.

En la batalo por siaj idealoj Bakunin devas kontraŭstari la celadon de du personoj: Mazini k Marks. Por la *homo* Mazini li havis grandan simpation, sed en Marks li vidis antipatiajn judajn inklinojn. Kontraŭ ambaŭ li nun ekbatalos. Ĉe Mazini li kontraŭbatalos la idealismon, kiu ĉie metas dion sur la plej grava loko. Sen dio nenia feliĉo. Ĉe Marks li kontraŭos la aŭtoritaran socialismon, la socialismon, kiu ligas sin al la ŝtat-ideo, kiu agnoskas gvidadon de supre, k kiu siavice endanĝerigas la liberon. En la jaro 1864 Marks projektis la programon de l' Internacio, per kiu oni povis doni al la afero de l' socialismo tute propran karakteron. En la sama jaro Bakunin fondas en Florenco iun Ligon, kiun li nomis „La Fraternité Internationale". Ĝi estis la antaŭulo de la pli konata k forta „Alliance", kiun li fondos kelkajn jarojn poste. La Ligo batalis kontraŭ Mazini. En sia programo ĝi deklaris sin por la ateismo, por plena neado de ĉia aŭtoritato k ĉia perforto, la likvido de la jura rajto. Ĝi propagandis liberan federacion, ĉiam de malsupre supren.

En 1866 Bakunin transloĝiĝis al Napolo, ĉar la tiea movado evidente havis pli da vivoforto. Li oratoris, verkis, fondis asociojn. Lia vigla naturo ne konis ripozon. La sudaj Italoj jam kutimiĝis al la apero de lia alta, larĝa staturo en siajn mediojn. K li mem facile alprenis la iom ekscesajn kondutmanierojn de l' popolo. Tamen li tute konsciis, ke en Napolo li ne povos trovi levilon por doni al sia granda revolucia plano la unuajn ekzistoformojn. Intertempe Karl Marks organizis per la Internacio laboristan movadon, kiu, kalkulante kun la konceptoj de aŭtoritato k disciplino, al la tuta socialismo en Eŭropo donos direkton kontraŭan al la konceptoj de absoluta libereco. Bakunin devis kontraŭstari tiun strebadon de Marks. Jen venis la komuniko, ke la demokratoj de Eŭropo, iliaj gvidantaj pensuloj k poetoj, intencas organizi kongreson, kiu okazos en Ĝenevo en septembro de la jaro 1867. La celo estos fondi asocion sub la nomo: „Ligo de Paco k Libero". La kongreso celis esti granda protesto kontraŭ la milito k politika tiraneco ĝenerale. Bakunin aliĝis ĝin k vojaĝis al Ĝenevo.

Dum preskaŭ ĉiuj parolantoj traktis la temon pri malarmado k ekstermo de l' milita ideo per maniero tro deklama, li subite aŭdigis alian tonon. Li diris i.a.: Tuta Eŭropo devas leviĝi k pretigi sin por la batalo kontraŭ la burokrataro, la centralizado k kontraŭ la perforto. Inter la popoloj venu internacia justeco. Ni devas kondamni la falsan naciecan principon, kiun Napoleono III eltrovis precipe por subpremi la liberon. Nacieco ne estas ideo aŭ principo: ĝi estas fakto, ne pli. Ĉiu, kiu sincere amas la liberon, devas rezigni la gloron k la potencon de sia patrio, devas ignori la vantajn k egoismajn interesojn de la patriotismo. Jam estas tempo por postuli la absolutan regadon de la libero. Ĉiu nacio devas esti aŭtonoma. K ne nur ĉiu nacio, sed ankaŭ ĉiu provinco k ĉiu komunumo."

Tiun programon, kiu sendube havas en si multe da nekonsekvenco k kiun ni rajtas nomi eĉ reakcia, li disĵetis en Eŭropon. Je la unua fojo oni diris sur grava tribuno, ke la Ŝtato devas malaperi, k ke ĉio devas solviĝi en aŭtonomio de l' komunumoj, de l' komunoj. Sen tio la ĝenerala paco ne eblas laŭ Bakunin.

Kiam tiuj vortoj estis diritaj k de parto de l' kongreso — eble ne tute konscie — aprobitaj, Bakunin daŭrigis sian agadon k formulis por ĉiam la programon de sia „Alliance de la Démocratie socialiste".

(Daŭrigota)

Kompilis B.W.

# Guto post guto, voje al Kongreso!

La benojn de la lasta jardeko ni konas.

La malriĉiĝinta mondo baraktas por fari ordon en la haoso.

Abundas la internaciaj kunvenoj: Konferencoj, kongresoj, procesoj. Longedaŭraj, laciĝaj, tedaj ili estas.

Ĉie ĉiam montriĝas la manko de unu komuna lingvo.

Tro malrapide oni progresas.

La mondo, la simplaj popolanoj, jam preskaŭ alkutimiĝas al tio.

Jam nun ni scias, ke en 1947 okazos la unuaj postmilitaj, Esperanto-Kongresoj internaciaj.

La XXXII-a Universala: en Svislando. Ankaŭ la XX-a SAT-Kongreso okazos en Danio.

Ĉu multaj Esperantistoj partoprenos?

Ĉu tiom multaj kunvenos, ke la Kongresoj altiros la atenton de la mondgazetaro?

Ĉu la Kongresoj estos pruvo, ke Esperanto estas ankaŭ io alia krom lingvo kun 16 gramatikaj reguloj?

La respondo dependas sole de ni. De nia bona volo.

De nia komuna emo al kunlaborado kaj helpo.

Ne estas egale, ĉu la nombro da partoprenantoj estos:

*500 ĉu: 5000!*

Entuziasmigi k instigi Esperantiston iri kongresen estas superflua. Ĉiu verdulo, ion ekscitiĝinta pri niaj Kongresoj, arde deziras partopreni ilin.

Tamen, la plimultaj inter la Esperantistoj estas jam preskaŭ konvinkitaj pri tio, ke ili neniam partoprenos......

(Por kelkaj el ili restas ebleco: se la Kongreso okazos en ilia lando.)

Kial tiel estas?

Pro la simpla fakto, ke oni ne disponas pri la necesaj monrimedoj.

Estas tiel, ĉar, koncerne al la vizitado de niaj Kongresoj, ni estas divideblaj laŭ *3 ĉefaj kategorioj:*

La unua: Grupo da „malbonŝanculoj", kiuj pro iu „teknika" kaŭzo ne povas partopreni; (pro profesiaj aŭ mastrumadaj devoj, familiaj cirkonstancoj ktp.);

la dua: Areto da „bonŝanculoj", liberaj de tiuj malhelpaĵoj, k cetere, kapablaj mem pagi;

la trian grupon formas la „amaso", da kiu la plimulto povas partopreni la Kongresojn. Nur... ili ne kapablas pagi (almenaŭ ne sufiĉe).

*Dekmiloj* inter ni, sole pro sia financa stato estas devigataj forresti!

Ĉu tio estas tolerebla? Ne. Male! Tion ni ŝanĝu.

*Jen nia simpla propono:*

*Ĉiu Esperanto-grupo,* — ekzistas miloj — ĉu sekcio, ĉu intersekcia rondo", eĉ tiu, konsistanta el nur dekduo aŭ kelkdekoj da membroj, *fondu specialan kason.*

Ni nomu ĝin: *„Kongres-kaso".*

Ĉiu aliĝinto kontribuu ĉiusemajne tiom, ke post unu jaro de ĉiuj estos kolektita sufiĉa mono, por ebligi partoprenon en la Kongreso al *almenaŭ unu membro.* Li (ŝi) apartenu al la supre menciita t.n. „tria kategorio".

Pretas doni detalajn informojn S-ro P. J. W. Schilperoord 101, Burg. Patynlaan, ZEIST — Nederlando.

# Kial la milito ne ekstermis la faŝismon.

Post la unua mondmilito, la popoloj iom post iom malkovris, ke la registaroj trompis ilin per bombastaj vortoj. La „milito por la rajto k civilizo kontraŭ la germanan militismon k prusan feŭdismon" — jen estas la pompa titolo, kiun oni donis al ĝi en Historio de la demokratiaj landoj; fakte estis batalo inter la angla-franca k la germana imperiismoj por nova dispartigo de la mondaj merkatoj. La imperiisma deveno de la dua mondmilito estas neduba k nemaskita. Estas ja konate, ke la „aks-ŝtatoj" okazigis ĝin je la nomo de la por sia industrio „vivnecesa spaco", k la demokratiaj landoj estis truditaj al defendo … aŭ kapitulaco. La ties ŝtatuloj alvokis al kvazaŭ kruca militiro kontraŭ faŝismon. La venko super la aksŝtataj armeoj estis kompleta. Sed en Hispanio restas faŝista fokuso: la Franko-diktatoreco. Kvankam ĝi ne konsistigas tujan minacon al la apenaŭ restarigita paco, la popoloj restas maltrankvilaj. Ili sentas kvazaŭ intuicie, ke la faŝisma danĝero daŭre ŝvebas super ili. Efektive, la demokratiaj k speciale la laboristaj gazetoj kun ŝajne sincera surprizo konstatas ke faŝismaj ĝermoj persistas. Ili pretendas, ke la „elpurigado" ne estis sufiĉe vigla. Ĉu do vane suferis k mortis milionoj da homoj? Tiun demandon mi deziras esplori ĉi tie.

★

Same kiel demokratio, faŝismo havas duoblan aspekton: politikan k ekonomian. Tiun lastan oni ne sufiĉe atentas, ĉar ĝi estas malpli videbla ol la unua. Ni unue trarigardu la konsiston de la burĝa demokratio.

La karakterizo de kapitalismo estas la liberalismo, t.e. la plena libero por ĉiu individuo ekzercadi kiun ajn profesion eĉ la plej parazitan, produkti k disvendi kiujn ajn varojn, eĉ la plej malutilajn k danĝerajn. Ne la kontentigon de la homaj bezonoj ekde la plej urĝaj celas la homa aktiveco k la produktado, sed nur kiel eble plej grandan k rapidan riĉiĝon, ĉar mono ebligas atingi potencon k honorojn. La nepra komplemento de la liberalismo estas la politikaj liberoj pri asociiĝo, kunveno, skriba k parola pensesprimado. Ja necesas ke homoj havantaj komunajn interesojn povu grupiĝi diversmaniere por defendi tiujn interesojn. Per tio ili provas akiri influon en la direktado de la ŝtataj aferoj dank'al politikaj partioj.

En la parlamento la ties reprezentantoj penadas akordigi kontraŭajn interesojn por starigi socian ekvilibron. En la kadro de la tiel difinita burĝa demokratio, la individuo ĝuas relativan liberon. Ĝi estas relativa, ĉar kiu esprimas ideojn, kiujn la regantoj opinias danĝeraj, tiu estas ofte persekutata, malliberigata k eĉ kelkafoje mortigata. Tiurilate la proletaro havas siajn martirojn kiuj pagis per sia vivo la atingitajn progresojn. Ja la burĝa demokratio ebligis al la laboristaro multe plibonigi sian sorton k la sistemon oni juĝas ĝenerale defendinda. Ĝi funkciis je la preskaŭ ĉies kontentigo dum la prospera periodo de l'Kapitalismo.

La unua mondmilito grave perturbis tiun funkciadon. Unue, la soveta revolucio detruis kapitalismon sur sesono de la mondo. En la venkitaj landoj (Centreŭropaj nacioj, Italio, restarigita Polio) la batalemo de la laboristaro minacis, imite al Sovetio, renversi ankaŭ la homekspluatadan sistemon. Tial, senhezite, la burĝaj regantoj starigis diktatorecajn registarojn kiuj per teruro detruis la laboristan movadon. Ili forigis la demokratiajn liberojn, ĉar ili timis, ke, lasante la revoluciulojn libere propagandi siajn ideojn, tiuj povus konkeri la ŝtatan povon per leĝaj rimedoj.

La mondkrizo kondukis Germanion pli poste al sama situacio. Ses milionoj da senlaboruloj k potencaj laboristaj partioj, kvankam malunuigitaj, estigis konstantan minacon al kapitalismo. Urĝis do forigi tiun danĝeron. Hitler fariĝis la taŭga homo tiucele; lia kontraŭmarksista, nacilsta k rasista propagando jam varbis sufiĉe da adeptoj por konsistigi potencan partion k formi la kadrojn de nova reĝimo.

Al tiuj diktatorecaj registaroj, oni donis ĝenerale la italdevenan nomon faŝismo. Malgraŭ apartaj naciaj karakteroj, ĉiuj havis ja la saman celon: detrui la socialisman movadon (en la etimologia senco de l'vorto socialismo.) Oni do difinis faŝismon tiele: „diktatoreco de l'kapitalismo super la proletaro." Jen estas la politika aspekto de faŝismo.

Kun ŝajno de justeco la nova reĝimo atakis la individuan liberon sur la ekonomia tereno; la ŝtato enmiksiĝis en la privataj aferoj por devigi la kapitalistojn k mastrojn akcepti disciplinon en la intereso mem de la ekzistanta produkta sistemo. Ni notu nur, ekzemple, la limigon de la profitoj en la entreprenoj. Do, en la faŝistaj landoj liberalismon anstataŭis laŭplana ekonomio kiu celis nur pluigi la disfalantan sistemon.

Jam aperis en la mondo alia malamiko ol la proleta revolucio: la mondkrizo, kiu subite eksplodis en la kapitalisma fortikaĵo, Usono, k etendiĝis al ĉiuj kapitalistaj landoj. En tiu mondkrizo la demokratiaj ŝtatoj baraktis same kiel la faŝistaj, k ili estis alkondukitaj al sama ekonomia politiko. Se oni daŭrigus lasi plenan liberon al la produktantoj, la malordo kondukus la reĝimon al kompleta ruiniĝo. La demokratia ŝtato enmiksiĝis do ankaŭ en la privataj aferoj por reguligi per rimedoj de ekonomia maltusiasnismo la produktadon, en la celo restarigi la Kapitalistan profiton. La parlamentaj liberoj estis ankaŭ limigitaj; al la leĝoj, esprimo de la parlamenta plimulto, la regantoj substituis dekretojn alprenitajn de ministraro, aŭ eĉ de ĉefministro aŭ ŝtatestro (kiel en Usono). Unuvorte en la demokratiaj landoj ekzistis „larva faŝismo", kiu, laŭ la cirkonstancoj, povus evolui en pli akra formo.

En Francio, tiu larva faŝismo provis kapti la povon la 6-an de februaro 1934. La vigla atento de la laboristaro sukcesis bari al ĝi la vojon. La popolfronta registaro regresigis ĝin, sed pro tio ke la laboristaj partioj ne havis sufiĉe viglan socialisteman reformplanon, ĝi poste rekonkeris parton de la perditaj pozicioj. Ne estas dube ankaŭ, ke se en Usono, la laboristaro havus pli klaran klaskonscion, pli revolucian sintenon, la tiea registaro estus uzinta perfortajn rimedojn okaze de revolucia provo. Ĉu la historio de la usona laborista movado ne instruas al ni, ke la „fera kalkanumo" estas senkompata kiam ĝiaj privilegioj estas minacataj?

Faŝismo aspektas do je la ekonomia vidpunkto kiel planita ekonomio por restarigi la kapitalistan profiton detruita de la krizo k pluigi ĝin. La teknika disvolviĝo kreis produktorimedojn, tiom potencajn, ke la liberalismaj leĝoj ne plu povas normale ludi, sen la nepro konduki la sistemon al disfalo. Tion pruvas la fakto, ke en ĉiuj demokratiaj landoj oni parolas pri la neceso starigi laŭplanan ekonomion.

Kiu konscias pri tio, tiu komprenas kial faŝismaj ĝermoj daŭre ekzistas. La armiloj de la demokratiaj landoj sukcesis detrui la diktatorecajn ŝtatojn, kie faŝismo prenis la plej akran formon, ĉar tie la laborista movado endanĝerigis la sociordon. Sed la milito ne povis forigi la ekonomiajn kaŭzojn, kiuj naskas diktatorecojn kiam necesas. La detruoj de stokoj da ĉiuspecaj varoj generante malabundon k ĵetante la popolojn en mizeregon, la intensa fabrikado de armiloj, ĉi ĉio restarigis por kapitalismo altajn profitojn; ĝi estas momente refirmigita. Sed samtempe la konflikto pligrandigis la mondĥaoson. La popoloj sopiras al socialismo. Tion scias la kapitalistoj; ili ne lasos sin senposedigi. La tendenco al faŝismo estas do ankaŭ pligrandigata. Ni troviĝas antaŭ jena alternativo: aŭ la ekonomio daŭrigos esti direktita al la kontentigo de la kapitalista profito k privataj interesoj (faŝismo), aŭ ĝi estos planita por la kontentigo de ĉiuj homaj bezonoj (socialismo.) Nur starigo de socialismo *mondskale* detruos faŝismon.

SATano 24. (22.5.1946).

## Kio kaŭzas nian enamiĝon?

Ne estas bagatelo enamiĝi, ĉar tiu ĉi „halucino" ofte difinas nian estontan vivon, nian feliĉon aŭ malfeliĉon. Ĉiu homo havas siajn proprajn „enamiĝkondiĉojn"; tio signifas, ke li postulas, ke la aliseksulo havu ecojn, kiuj kontentigas lian amsenton. Tiuj postuloj povas esti tre diferencaj, kaj ŝajnas iom strange, ke ili ofte estas tute nekonsciaj. Ĝenerale ni tute ne konscias, kio en la objekto de nia subita amo tiom ravis nin.

Ĉiuj sentumoj povas partopreni en tiuj postuloj k ĉio, kio estas perceptebla, povas veki eĉ ne la iluzian senton, kiun ni nomas amo.

Bela hararo, tipa voĉo, distinga odoro, belforma piedo, sensignifa makuleto denaska aŭ iu sprita diraĵo tiel bone povas kaŭzi la ekflamiĝon kiel aliaj hazardaĵoj, ekz. iu vestaĵo, ia situacio, eĉ iu malbona eco aŭ iu nenormalaĵo.

Konata ekzemplo el la mondhistorio estas la fatala enamiĝo de Henriko III en Maria von Kleef, enamiĝo, kiu kostis la vivon de miloj da homoj k kaŭzis longajn militojn inter la popoloj. Maria estis tiutempe la fianĉino de la princo de Condé k dum festo ĉe la reĝo de Navarre tiom multe dancis, ke ŝi en iu ĉambro devis surmeti sekan ĉemizon. Henriko iom poste venis en la saman ĉambron; ankaŭ li multe dancis k en la mallumo li prenis tukon por forviŝi la ŝviton de sia frunto. Sed tiu tuko estis la malpura ĉemizo de Maria, kiu estis saturita de la odoro de ŝia korpo. Tiu odoro tiom ravegis lin, ke li spitis la tutan mondon por ŝin konkeri.

Estas kompreneble, ke edziĝo, bazita sur tia enamiĝo, facile povas fiaski, ĉar ni malfacile povas paroli ĉi kaze pri edziĝo, kiu realiĝis pro raciaj konsideroj. La enamiĝo — okazante ofte jam dum la unua renkonto — sendube estas necesa por elekti al ni la parulon por la vivo, sed ĝi ne garantias feliĉan k sukcesan geedziĝon. Por tio necesas, ke ankaŭ raciaj konsideroj ludu rolon ĉe nia elekto. Niaj personaj „enamiĝkondiĉoj" instinkte direktas al ni la vojon al la „paradizo", sed estas tre konsilinde, ke ni, surirante tiun vojon, tenu la okulojn malfermitaj k la kapon malvarma. Ni ja ne forgesu, ke tio, kio kaŭzas nian enamiĝon, ĝenerale ne estas daŭra. Belaj, blondaj haroj k allogaj kruroj ne ĉiam restas blondaj k allogaj. La enamiĝkaŭzoj havas ofte mallongan vivon. Ili pli malpli frue malaperas, k kun tio ofte malaperas ankaŭ la origina erotika altirforto. Tial ni devas bedaŭri, ke la homo ĝenerale ne enamiĝas en la tutan homon k ke li eĉ ne konscias pri tio, kio tiom allogas lin. Estas fakto, ke la erotiko ĉe la elekto de nia edz(in)o ludas tro superan rolon. La amo „ĉe la unua vido" ja pruvas tion.

Alvino.

**AMSTERDAMA S.A.T.-RONDO.**

Dimanĉ-matene, la 24an de nov. K-do Faŭlhaber lekcios pri Literaturo. Komenco je la 10a. Loko: „De Arend" Planciustr. angulo Breeuwerstr.

La Perantino.

**ROTERDAMA S.A.T.-RONDO.**

„Religio k Ateismo" estas la temo, kiun K-do Coppens traktos en la venonta kunveno, la 24an de nov. en Rusthoflaan 53. Komenco akurate je la 10.30.

**La historio instruis al ni, ke la mondo estas malfacile unuigebla per militaj konkeradoj. Fiaskis en tio la Romaj imperiestroj, Napoleono k Hitler. Estas tre neverŝajne, ke nova konkerulo havos pli da ŝanco je sukceso. Tial ni agas prudente, se ni subtenas neniun konkerulon. Ni konsciu, ke nacia subpremo plifortigas la naciismon tiel ĉe la subpremanto kiel ĉe la subpremato. La mondo unuiĝos nur kiam pro la neceso sufiĉa parto el la homaro estos MATURA por tio.**

# Kiel ni devas eduki niajn infanojn?

Ĉiu patrino devus meti al si tiun demandon, fakte jam antaŭ la naskiĝo de sia unua infano, k ŝi agus prudente, se ŝi daŭre ripetus tiun demandon ĝis kiam la infanoj estos plenkreskaj.

Iuj ne faras al si multe da zorgoj, kredante ke ĉiu patrino posedas denaskan instinkton por eduki; ili tial liberigas sin de pripensado, ĝis kiam ili renkontiĝas kun malfacilaj kazoj, kiujn la t.n. „instinkto" ne kapablas solvi.

Aliaj virinoj agas inverse. Ili opinias, ke pedagogiaj sistemoj plene povas savi ilin, ili frekventas kursojn k trastudas dikajn librojn kun la rezultato, ke ili pro ĉiaj kontraŭaj konsiloj tute perdas la vojon k fine fariĝos daŭre pli senhelpaj koncerne la malfacilaĵojn de la reala vivo.

Estas tute vere, ke por ĉia interrilato kun homoj necesas iu denaska taŭgeco. Iuj homoj posedas jam kiel infanoj la takton, la egalpezon, la afablon, mi emas diri la saĝon, kiuj ebligas al ili trankvile k racie interrilati kun aliaj homoj, dum aliaj homoj tute malhavas tiujn ecojn k kies peno por ilin akiri, vanas. Sed ĉi ĉio estas ie alia ol la t.n. patrin-instinkto. Ekzistas prudentaj k malprudentaj patrinoj same kiel ekzistas prudentaj k malprudentaj instruistoj, predikistoj k kuracistoj, k patrino idole amanta siajn infanojn ja ankaŭ povas aparteni al la malprudentaj.

Jes, amo estas la plej grava faktoro ĉe la edukado, k koncerne tion la patrino havas grandan naturan avantaĝon. Sed la amo devas esti malegoista, k en la t.n. patrin-instinkto troviĝas granda dozo da sinamo. Eblas al la amanta patrino senlime sin oferi por siaj infanoj, eĉ doni sian vivon por ili, sed — kiom ajn paradokse tio ŝajnas — tio ne estas garantio, ke ŝi celas la bonon de sia infano. Precipe tiuj idole amantaj patrinoj ofte deziras teni siajn infanojn nematuraj k dependaj, por ke ĉi tiuj kiom eble plej longe bezonu la patrinan amon. Tamen por la infanoj mem estas tre grave, ke ili kutimiĝu al menstareco, ke ili iĝu maturaj k sendependaj. Infanoj, havantaj spiritan aŭ fizikan mankon, infanoj timemaj aŭ mallertaj, ofte estas tiom tro dorlotataj k protektataj de l' patrino, ke ili plene konsciiĝas pri sia malplivaloreco k perdas la emon batali kontraŭ ĝi. Estas tre verŝajne, ke brava k prudenta edukado en tia kazo sanige efikas. Edukado havas nenion komunan kun instinkto. Male, kiu volas eduki, fariĝu konscia k racie pensanta homo, kiu jam lernis regi siajn instinktojn.

Pligrandigante sian scion, precipe pri la psika vivo de si mem k aliaj, oni povas progresigi tiun konsciiĝon, sed estas rekomendinde, ke oni ne superŝarĝu sin per instruiteco. La plimulto el la patrinoj sendube pli profitas per unu libro aŭ unu kurso, kiujn ili funde pripensadas k kies principojn ili kontrol-komparas kun la reala vivo, ol per ĉiaj kontraŭaj asertoj, kiuj grandparte restas griza teorio aŭ kiujn ili erarmomente k sen interligiteco provas ĉe la infanoj. Per racia pensado oni atingas pli ol per duonkomprenita klereco de aliuloj.

Ni neniam malatentu, ke neniu havas sian sorton aŭ tiun de siaj infanoj en propraj manoj. Edukado estas tre grava, sed ĝi estas ligita al iuj limoj. Necesas do sinteno de rezigno k la konscio, ke ĉio, kion ni faras, havas nur limigitan signifon. Multaj gepatroj, kiuj komencis sian taskon plena de idealismo, koliziis kun malfacilaĵoj, kiujn ili antaŭe tute ne imagis. Ĉiu infano ja venas en la mondon kun iu karaktero, kontraŭ kiu la gepatroj grandparte estas senpovaj. Same kiel la gepatroj ne povas decidi pri beleco aŭ saneco de siaj infanoj, ili ankaŭ ne povas decidi pri la karaktero de siaj infanoj. Tiujn karakterajn trajtojn ili ne povas ŝanĝi, ili povas nur influi ilin, tio estas: krei favorajn kondiĉojn por la disvolviĝo de la infano.

Kion signifas tio: krei favorajn kondiĉojn? Unue ekzistas la sociaj kondiĉoj, sed ŝanĝi tiujn kuŝas grandparte ekster la povo de l' gepatroj. La infano plej bone prosperos, se ĝi kreskadas en luma, pura k vasta loĝejo, se ĝi estas bone nutrata k ofte povas ĝui la liberan aeron, se ĝi povas frekventi bonajn lernejojn, sed ĉi ĉio dependas parte de la materia stato de l' familio. Ne al ĉiu eblas doni tion al siaj infanoj.

La kondiĉoj, super kiuj ni certagrade regas, estas la psikologiaj. Por tio necesas psikologia scio k kompreno, kompreno pri la animo de l' infano k ankaŭ pri propra animo.

*Ĉar edukado estas samtempe sinedukado.* La moderna psikologio instruas al ni kiom gravegaj estas la kompleksoj de la unuaj infanjaroj por la posta vivo. Amo k malamo, timo k jaluzo, sento esti privilegiata aŭ maljuste traktata, jen faktoroj el la frua junaĝo, kiuj grave influas la postan vivon. La ligo de interkompreniĝo inter gepatroj k infanoj estas la plej grava faktoro en la edukado. Ĉe la juna infano tiu ligo estas kompreneble nekonscia, sed la gepatroj devas celadi en sia interrilato kun la infano al konscia k racia agado. Por eduki infanojn, oni devas fakte esti sanktulo, diris Maria Montessori. Sed sanktulo neniu el ni estas. Bona patrino ne estas patrino, kiu neniam eraras, sed kiu daŭre volas lerni per siaj eraroj, kiu ĉiam estas malferma por novaj opinioj k kiu en sia interrilato kun siaj infanoj daŭre okupiĝas pri sia propra edukado.

Josine W. L. Meyer en „Wij Vrouwen."

## KORESPONDADO

— D-ro J. Miguel Reyes, *Tartagal*-Manuela Pedraza F.C.C.N.A. Provinco Salta; Argentino, pri ĉiuj temoj. Li nepre respondos.

— K-do João Patricio de Melo, Rua B no. 13, 3 à Calcado Poco dos Mouros, LISBONO, Portugalio, kun k-doj el ĉiuj mondpartoj! Respondo certa!

— Anoj de la laborista rondo „La Vekiĝo" kun ĉiulandaj k-doj. Skribu al José Marques; Rua da Amoreira 24, BARREIRO, Portugalio.

— K-do H. J. Bosma, Butterlaaan L 16, *Heiloo*, Nederl. Li garantias interesajn leterojn.

— K-dino Willy v. d. Brink, Vlasakkèrstr. 27b, *Roterdamo*, Zuid, Nederl. Skribu al ŝi grandnombre; ŝi nepre respondos.

— Karl Kaiser, MAINZ-GONSENHEIM. Kirchstrasse 69, Germanio, kun la tuta mondo, ankaŭ per poŝtkartoj, poŝtmarkoj.

— Laborista Grupo en *Roterdamo* zuid. Skribu al M. A. Blok, Hoogvlietstr. 48b. R-dam, Nederl.

— K-do J. G. Kuster, Madoerstr. 26, Hengelo (O), Nederl. Li faris stenografi-sistemon por Espto, k nun deziras korespondi kun k-doj el ĉiuj landoj, kiuj interesiĝas pri stenografio.

— K-do Josefo Bernabeu, 8 rue Jacques d' Aragon, Montpellier (Hérault) Francio, kun ĉiuj landoj pri filatelio k anarko-sindikatismo. Respondo garantiata!

— K-do T. A. Seel, 210 Cumberland Avenue, HAMILTON, Ontario, Kanado.

— K-do Petro van Gerdingen, Nicolaas Beetsstr. 96b, Roterdamo, W, Nederl. estas tramisto k deziras ricevi bildojn de diversaj tramoj k aŭtobusoj el ĉiuj landoj. Li pretas sendi bildojn de roterdamaj tramoj.

— La S.A.T.-rondo en STADSKANAAL aranĝos LETERVESPERON. Ĝi esperas, ke ĉiuj kluboj k multaj personoj sendos al ĝi vivosignon. Adreso: Daniel de Raaf, Kijl 7, 2e EXLOËRMOND, Nederl.

— Bas Wels petas korespondantojn por siaj samklubanoj.

## *Ekspozicio.*

La laboristaj esperantistoj en OSLO aranĝos ekspozicion k petas al ĉiuj espkluboj k ĉiuj fervoraj esp-istoj sendi al ili leterojn, kartojn k alian materialon uzeblan por la propagandcela elmontrado. Skribu k sendu ĉion al k-do Rosendahl Uelands gata 63, OSLO 38, Norvegio.

K-do Rosendahl informis nin, ke la sindikata kongreso — kiu reprezentas pli ol 400.000 gelaboristojn — unuanime decidis morale k ekonomie subteni la laboristan esperantomovadon en Norvegio.

## LISTO DE NIAJ ĈEFAJ PERANTOJ k TABELO DE LA KOTIZOJ POR 1947.

— Alĝerio: Kdo Noël BARBRY, 110 Boul. Bru, Alger. — 100 fr. fr.
— Argentinio: Kdo J. DURAN, Casilla Correo 1802, Buenos Aires — 8 pes.
— Australio: Kino A. C. HINTZE, 17 Myfield, St Coburg N 13, Victorio — 5 ŝil.
— Aŭstrio: Kdo BASTEELS G., 190 rue de Monténégro, Forest-Bruxelles — 40 fr. belg.
— Brazilio: Kdo Rob. das Neves, ĉe Esperanto-Klubo, str. Araujo Porto Alegre 36, Rio de Janeiro — 50 Kruz.
— Britio: Kdo O. MELTON, 19 Brentwood Grove, Great Barv., Birmingham-22-a — 5 ŝil.
— Bulgario: Kdo PANTELEJ STOJANOV ĜUMAKOV, Str. Mozava 89, Sofio — (?)
— Ĉekoslovakio: Kdo J. PATERA, Dvorakova 24, Pilzen — 60 kr.ĉ.
— Ĉilio: vakas.
— Danio: Kdo R. JORGENSEN, J. P. Jacobsensvej 59, Aabyhoj — 7,75 k.d.
— Finnlando: Kdo Joel VILKKI, Somerp. — (?)
— Francio: ĉe S.A.T., 67 av. Gambetta, Paris-20 (poŝt konto No 1234-22-Paris). — 100 fr. fr.
— Germanio: por tuta Germanio: Kd Ludwig PUFF, Am Ebelfeld 249, Frakfurt-a/M.-Praunheim (16) (?)
Aparte por la brita zono: Kdo E. SCHIDT, Hirtenstr. 6. Dortmund (21a)
— Por la usona zono: Kdo Hermann WAGNER, Im Himmelsberg 10, bei Präsident Neuffer, Stuttgart (14)
— Por la franca zono: Kdo Julius MATHES, Sternwaldstr. 5, Freiburg i./Breisgau (17-a)
— Hungario: Kdo Bela BLEIER, Hargita-utca 10, Pestszentlörincz. (?)
— Italio: Kdo Mario GUZZI, Via Modena 33, Torino. — 100 Liroj.
— Japanio: vakas.
— Jugoslavio: Provizora peranto: Kdo Premuj VJKOSLAV, M. Stanivukovića 4.I. Osijek II. Provizore 10 respondkuponoj.
— Meksikio: Kdo Jozefo SERANO, Central de Talabarteros 72, Col. Carranza, Meksiko D.F. (?)
— Nederlando: Kdo Bas WELS, 1e Wandeloorddw.str. 33, Rotterdam 3.— gld.
por monaferoj: C. v. Essen, Floretstraat 10, R.dam-Z.
— Norvegio: Kdo Jorgen ROSENDHAL, Uelandsgata 63, Oslo-38.
— Nov-Zelando: vakas —
— Palestino: ne ankoraŭ difinita, — ni rilatas kun pluraj Kdoj —
— Polio: Kdo Albin PIOTROWSKI, Jasna 8, Krakow (?).
— Portugalio: Kdo João Frazao de FARIA, Rua José Estevao No. 26, 3° E. 50 esk., Lisboa.
— Sud-Afriko: Kdo David DAMBE, P.O. Box 2418, Johannesburg. 5 ŝil.
— Svedio: Kdo Justo BOBERG, Palmfeltsvägen 49, Enskede. 5 Kr. (poŝtĝirokonto No. 3815).
— Svisio: Kdo Auguste BAVAUD, Charmille 30, Genève.
— Usono: Kino Myrthe R. DOUGLAS, P.O. Box 6475, Metro St. Los Angeles 55, Calif. 1,25 $.

*Rimarkoj:*

— pri la landoj markitaj per la signo (?) = pro la malstabilo de la tiea valuto, k absoluta nescio pri la aĉetpovo de la meza salajro, ni ne kapablas fiksi la kotizon; ni fidas al niaj perantoj por ĝin bonjuĝe ciferi. —

## Ĉu vi jam posedas?

JIMMY HIGGINS de Upton Sinclair, 372 paĝoj, 80 f.f.; 1.50 gld.

SKIZO DE EKONOMIA GEOGRAFIO de Horabin; tre interesa! 85 f.f.; 1.60 gld.

LA BRAVA SOLDATO ŜVEJK de J. Hašek; 154 paĝoj; 70 f.f.; 1.25 gld.

UNUA LEGOLIBRO, (diversaj rakontoj) 104 paĝoj; 40 f.f.; 0.75 gld.

Mendu ĉe S.A.T. en Parizo aŭ ĉe C. v. Essen, Roterdamo.